

Ankno 27/2-97

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

1996:3-6

## Esperantogården en Lesjöfors.

Nun ĝi estas realaĵo!



## LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694  
Januaro 1997 • 84-a jarkolekto  
Fondita en 1913

### Redaktör:

Jan Setréus  
Mörtgatan 7 SV,  
133 43 Saltsjöbaden  
tel. 08-717 75 67

### Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: [espero@esperanto.se](mailto:espero@esperanto.se)

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: Rönquist & Co, Sollentuna

Prenumeration 1997: 170 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

### Medlemsavgift 1997:

Direktansluten medlem 170 kr.  
Famijmedlem (utan tidning) 75 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 75 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*.

## ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08-34 08 00

Fax: 08-34 08 10

Postgiro: 578-5

Telefontid: Samma som EsperantoCentro Stockholm.  
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson,  
Seminarieatan 3 A, 752 28 Uppsala

### OBS!

**Manus till *La Espero***  
sänds till Jan Setréus  
Mörtg. 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden

*La Espero* estas presata sur recikligita papero.

# Timas nenion

La nova redaktoro de *La Espero* timas nenion, komentis la teknika redaktoro la suban foton. Mi volas aldoni mem ke la legantoj devas esti pli ferocaj ol la bestoj en Brazilo por povi timigi min, kaj la fakto ke mi preskaŭ estis la sola kandidato fariĝi redaktoro eble indikas ke ili vere estas.

Serioze mi esperas ke la legantoj, kiuj pacience atendis ĉi tiun prokrastitan numeron, kaj la kontribuantoj kiuj indulge ne plendis pri la malfruigo, ankaŭ toleros kaj pardonos miajn baldaŭajn kaj multajn erarojn. Mi estas komencanto pri redaktado kaj bezonas la apogon de tiel kontribuantoj kiel legantoj.

Kiel esperantisto mi ne plu povas senkulpiĝi min pri miaj lingvaj eraroj

aludante mian novicecon: Mi esperantigis jam en la jaro 1975. Kelkaj esperantistoj en Stockholm, Gävle, Uppsala kaj Lidköping jam konas min. Mi loĝis en tiuj urboj.

Eksterlandanojn kiuj konas min oni plej facile trovas en Tanzanio, ĉar mi dum pluraj jaroj kunlaboris libertempe pri esperantostudado kun esperantistoj en tiu lando.

La foto de mi kaj la sovaĝa besto fakte klarigas ke mi ne volonte krokodilas (Vidu la fermitajn buŝojn!). Antaŭ pluraj jaroj mi eĉ skribis lernolibreton por komencantoj nomata *Ne Krokodilu*. Nu, mi devas konfesi, ke la besto sur la foto nur donis al mi la eblecon kajmani.

Jan Setréus



## ESPERANTOFÖRBUNDETS STYRELSE

**Ordförande:** Roland Lindblom, Stenbockens gata 102, 136 62 Haninge,  
tel. 08-777 41 75

**Vice ordförande:** Franko Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,  
tel. 08-712 82 91

**Sekreterare:** Kaisa Hansen, Hagvägen 14, 194 40 Upplands Väsby,  
tel. 08-590 882 10

**Kassör:** Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde,  
tel. 0500-41 22 05

**Ledamot:** Jill Hilford, Sockengatan 113, 252 51 Helsingborg,  
tel. 042-13 01 70

**Ledamot:** Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas väg 6, 641 37 Katrineholm,  
tel. 0150-52 387

**Ledamot (ungdomsverksamhet):** Fredrik Olofsson, Studiegången 3-323,  
416 81 Göteborg, tel. 031-19 84 49

**Suppleant:** Anita Bergh, Hasselgatan 60, 194 37 Upplands Väsby,  
tel. 08-590 858 72

**Suppleant:** Bengt Nordlöf, Boforsgatan 23, 123 46 Farsta,  
tel. 08-93 41 70

## SEJUS STYRELSE

**Ordförande:** Anna-Lena Eriksson, Gnejsvägen 10 B, 907 40 Umeå,  
tel. 090-19 56 28

**Kassör:** Fredrik Olofsson, Studiegången 3-323, 416 81 Göteborg,  
tel. 031-19 84 49

**Ledamot:** Keiko Snarberg, Johan Skyttes väg 15, 554 48 Jönköping, 036-71 37 99

**Ledamot:** Janko Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-712 82 91

**Ledamot:** Anna-Lena Vickström, Djurgårdsvägen 39 C, 681 53 Kristinehamn,  
tel. 0550-155 56

# Kio okazis al *La Espero*?

Ĉu la estraro de SEF komencis agi kiel nuntempaj politikistoj? Ĉu SEF, same kiel komunumoj, devas draste eviti elspezojn por ŝpari? Ne – tute ne! Eĉ ne la kasisto de SEF, plene ĝojas pro neelspezita mono, kiam nia organo ĉesis aperi meze de 1996.

Ni preparis informan numeron en aŭgusto, kaj troviĝis sufiĉe da materialo. Restis la laboro enskribi la tekstojn kaj aranĝi paĝojn. Paĝoaranĝo estas komputila afero. Tia laboro estas komplika, kaj sperta persono bezonas minimume 3 tagojn por ĉio. Franko Luin estas tiu sperta persono kaj li posedas modernan ekipaĵon en sia propra firmo, sed tiam venis liaj klientoj kun mendoj. En tia kazo estas evidente ke, *La Espero* devas atendi. Franko devis labori ankaŭ sabato kaj dimanĉe por kontentigi siajn klientojn – ne troviĝis liberaj horoj por pretigi la gazeton.

Post kelkaj semajnoj da atendado Franko informis ke daŭre venas novaj mendoj de la klientoj, kaj li ne vidis eliron el la malagrabra situacio.

## Jes, sed post reveno el Sudameriko

La SEF-estraro kunsidis fine de septembro dum du tagoj, kaj unu punkto, verŝajne la plej grava, estis ke ni devas trovi novan redaktoron post provizora periodo kun tri redaktoroj. Unu persono ŝajnis tre interesa por la estraro – Jan Setréus. Mi tuj poste telefonis al Setréus, kaj ekĝojis, kiam mi post diversaj klarigoj pri redaktoraĵoj, ricevis jeson. Sed ĝuste en tiu momento li estis pakanta sian valizon por forveturi de Svedio al Sudameriko. Li diris ke li restos tie ĝis la fino de la jaro.

Dankon por la akcepto fariĝi redaktoro – sed kion fari ĝis lia reveno en januaro? La sola persono krom Franko, kiu scias pri paĝoaranĝa laboro, estas Per Aarne Fritzon, kiu antaŭe estis redaktoro.

Ne estis facile trovi lin, ĉar montriĝis ke li ankoraŭ studas – tage, vespere kaj eĉ nokte – por ekzameniĝi kiel ĵurnalisto en januaro. Li sciis, ke li bezonus pli longan tempon por pretigi numeron de *La Espero* ol Franko. Tiu tempo ne troviĝis por li. Estis facile kompreni lian starpunkton, sed tre peze por mi ricevi tiun respondon.

## Helpas, se oni konas esperanton

La estrarano Bengt Nordlöf provis trovi iun el inter eksaj kolegoj, redaktoroj kiuj povus helpi min. Kiam li finfine trovis iun, la respondo fariĝis ne, ĉar la aktuala persono ne kuraĝis pro nescio de esperanto.

La ideo aperigi informnumeron pli kaj pli malaktualiĝis, ĉar ni devus informi la SEF-membraron pri novaj kotizoj ĉe UEA kaj SEF por 1997. Ni devus informi pri venontaj eventoj kaj pri la Esperantodomo en Lesjöfors.

La sola solvo estis sendi leterojn al la kluboj kaj al ĉiuj rektaj membroj de UEA. Kaisa Hansen kaj Lisbet Andreasson pretigis informojn kaj blankecojn, kaj poste Kaisa Hansen priorzigis la pretigon de la kovertoj kun adresoj kaj enhavo ĝis inkluzive la enpoŝtkestigo.

Pluraj membroj telefonis al Esperantocentro kredante, ke okazis misdistribuo fare de la Poŝto.

## La estraro petas pardonon de la membroj

La estraro humile petas pardonon pro la nekapablo solvi la gazetproblemon. Oni povus kredi, ke la sveda movado kolapsus pro manko de movada organo. Ŝajnas al mi, ke okazis inverse. Mi trovis, ke pluraj kluboj laboris pli energie ol kutime, kaj sukcesis fari bonan reklamon kaj aranĝi kursojn. Ankaŭ la

numero de informpetoj rekte al SEF kreskis en 1996.

Ni povas konstati, ke pli da homoj interesiĝis pri esperanto dum 1996 – kaj mi antaŭvidas kreskantan interesecon dum 1997.

Tio kompreneble dependas de la radioprogramo de "Eduka Radio". Tiu programo ne estus aperinta, se Carl-Erik Ohlsson en Skövde, ne inteligente persvadis la programgvidanton Björn Adin. Ni tre ĝojas kaj dankas al Carl-Erik, kiu iniciatis la tuton.

Fine mi notas ke la Esperantodomo en Lesjöfors estas realaĵo. Kelkaj tre celkonsciaj personoj multon faris, kaj inter ili troviĝas la vera animo de la projekto – Lennart Svensson. Mi sendas specialan dankon al Lennart – kaj mi sentas, ke ĉiuj esperantistoj en Svedio plene apogas min en tiu danko.

Roland Lindblom

## FINNKAMP

Ditt medlemskap som direktmedlem gör UEA starkare och dig bättre informerad. Avgifterna har sjunkit en del för 1997 (kronan har blivit lite starkare).

UEA:s generaldirektör, Osmo Buller, anser nu, efter att ha gått med på avgiftssänkning, att vi i Sverige bör kunna öka andelen medlemmar till UEA. Osmo Buller pekar utmanande på finska esperantoförbundets medlemmar. Där är andelen UEA-medlemmar avsevärt högre än i Sverige. Låt det bli en s.k. finnkamp! Lägg märke till att kategori MG passar bra som familjemedlemskategori.

Roland Lindblom

# KOTIZOJ DE UEA

en svedaj kronoj

<b>MA</b> Membro-abonanto, kiu ricevas la revuon <i>Esperanto kaj la Jarlibron</i>	400
<b>MJ</b> Membro, kiu ricevas la <i>Jarlibron</i>	160
<b>MG</b> Membro kun <i>Gvidlibro</i>	70
<b>SZ</b> Societo <i>Zamenhof</i>	800

Bv. pagi al la poŝtgira konto "Esperantoförbundet, Specialkonto" 14 74 29-5.

La saman poŝtgiran konton vi uzu se vi volas aboni revuojn. Informojn tiurilate vi ricevas de Lisbet Andreasson per tel. 0415-50 152.

# Pasporta Servo 1996/97

## ESPERANTA TURISMO- SERVO, TANZANIO

Mi bonvenigas demandojn aŭ petojn de individuaj aŭ grupaj vizitantoj, turistoj, vojaĝantoj kaj turismaj entreprenoj aŭ firmoj ĉirkaŭ la mondo, kiuj scivolos pri turismo en Tanzanio aŭ kiuj intencas fari vizitajn aŭ turismajn vojaĝojn al Tanzanio. Mi helpas vizitantojn, turistojn kaj vojaĝantojn solvi kaj trovi diversajn aferojn.

Ankaŭ mi serĉas kunlaborantojn por investi en turismajn projektojn.

Korespondu en Esperanto aŭ la angla. Enmetu 2 IRK-ojn por pli da informoj. Mi atendas vin. Elkoran bonvenon!

Kontaktu:  
S-ro Sylvester N.  
Nyinyimbe  
P.O. Box 147  
Bunda  
Tanzanio

Ĝi aperis! (Ĉu denove?)

Post iom pli ol naŭmonata gravedeco TEJO naskis en junio tutfreŝan kaj aktualan version de unu el siaj plej konataj servoj. Ĝi pezas 80 gramojn, havas 128 paĝojn kaj 784 gastigantojn en 68 landoj. La fieraj patroj: Derk Ederveen, Danny ten Haaf kaj Jeroen Balkenende.

Kompreneble temas pri *Pasporta Servo 1996*, adreslisto de esperantistoj kiuj pretas senpage hejme gastigi aliajn esperantistojn. La fierecon kaŭzas pluraj novaj kialoj. Plej rimarkindas, ke ĝi aperis sen ajna prokrasto. Due, ni aŭskultis al kelkaj voĉoj de uzadintoj. Tio rezultis inter alie al pli malgranda formato (kiel la Jarlibro), pli malgrandaj literoj kaj dividado en ĉapitrojn laŭ kontinento. Ĉi-lasto ebligas pli facilan ŝiradon laŭ via vojaĝocelo, por ŝpari pezon en via tortistoro.

Ni fieras ankaŭ pri la maparo indikanta loĝlokojn de la gastigantoj. Antaŭe ĝia farado (kun siaj eraroj) ĉiam

bezonis ŝvitigan noktaron da laboro kaj multe da gluo, sed nun la evoluinta tekniko helpigis nin: la mapoj estas komplete desegnitaj de komputilo.

Pro nia lokŝparemo devis malaperi la gajaj valizetoj de Martin Burkert. Tamen li denove desegnigis por ni la frontpaĝon.

La nombroj de gastigantoj (784) kaj landoj (68) estas malpli altaj ol en la antaŭa eldono. Sed ni aŭdace asertas, ke la nombro de validaj adresoj estas tamen pli alta; centprocentan validecon ni bedaŭrinde neniam povus atingi, pro la ĝenerala transloĝigemo de esperantistoj. Ĉiuj listigitaj gastigantoj intertempe ricevis la libron senpage perpoŝte. Aliaj povas aĉeti ĝin kontraŭ modesta prezo. Petu ĉe la landa sekcio en via lando aŭ ĉe la grandaj libroservoj.

Jeroen Balkenende  
*estrarano pri Pasporta Servo*

## Kio estas Pasporta Servo?

Pasporta Servo estas servo de la Esperantomovado por Esperantoparolantoj. Ĝiaj membroj havas la eblecon ricevi senpagan gastadon. Ĉiu kiu posedas propran ekzempleron de la listo de gastiganto estas membro, kaj rajtas uzi sian liston por trovi gastigon.

La listo estas persona. Oni ne rajtas prunti sian liston al alia persono. Por ke la listo validu, ĝi devas havi la nomon de la posedanto sur la kovrilo.

Gastigado pere de Pasporta Servo ne nepre estas luksa. Ĉiuj variantoj ekzistas, de surplanka dormado en propra dormsako, ĝis rajto je utiligo de tuta domo.

Kaj ne forgesu: Pasporta Servo estas servo por Esperantoparolantoj, do ĝiaj membroj devas scii Esperanton!

### Kiel mi fariĝas membro?

Ekzistas du manieroj membriĝi:

1. Oni aĉetas la liston de gastigantoj, kaj skribas sian nomon sur la kovrilon. Ĉiujare nova listo estas eldonata; ĉiu listo validas ĝis la sekva eldono.
2. Oni fariĝas gastiganto. Ĉiu kiu mem aperas en la listo kiel gastiganto senpage ricevas ekzempleron de la listo, kaj tiel fariĝas membro. Gastiganto devas **ĉiujare** konfirmi ke li volas resti en la listo.

### Kiel mi fariĝas gastiganto?

Petu aliĝilon de:

Pasporta Servo de TEJO  
Nieuwe Binnenweg 176  
NL-3015 BJ ROTTERDAM  
Nederlando

### Kiel mi povas uzi la liston?

Ĉu vi volas gastigi ĉe iu gastiganto? Sekvu la instrukciojn de la gastigantoj kiuj aperas en la listo (ekzemple antaŭa skriba aŭ telefona peto, nombro da eblaj tagoj aŭ gastoj, k.t.p.). La gastado inkluzivas senpagan tranoktadon; pri aliaj aferoj (manĝoj, vizito de urbo k.s.) oni devas ĉiam interkonsenti kun la gastiganto.


### Kiuj prizorgas la liston?

La kompilanto de Pasporta Servo ricevas ĉiujn informojn (aliĝojn, realiĝojn, ŝanĝojn) de la gastigantoj kaj aldonas tiujn en la liston. Helpas lin la lokaj perantoj kaj landaj organizantoj kiuj serĉas novajn gastigantojn en sia urbo aŭ lando. Ili krome ĉiam povas informi vin pri la loka situacio, kaj helpi vin trovi gastiganton.

Ni invitas vin bone uzi Pasportan Servon, kaj deziras al vi agrablajn gastadon kaj gastigadon!

### La kompilanto kaj TEJO

En Svedio oni povas aĉeti la liston de:  
Esperanto-Centro  
Vikingagatan 24  
113 42 Stockholm



## KORESPONDI DEZIRAS

Deziras korespondi kun svedaj gesamide-anoj pri ĉiuj temoj, 33-jaraĝa oficisto. Luiz Duarte Caixa Postal 163 Rio de Janeiro 20 001-970 Brazilo

.....

Litovino de 40 jaroj kiu laboras en malsanulejo atendas leterojn de svedaj esperantistoj. Interesiĝas pri geografio, bildkartoj kaj kantado. Vitalija Gelucevieiene Dangai, Naujoj 20 Alytaus rej Litovio

.....

Dudek sesjara farmacisto ĝojus korespondi kun svedaj esperantistoj. Ŝatas muzikon, aliajn popolojn, pentrarton, literaturon kaj amikecon. Fábio Brandt de Souza Rua Joao Luicio Marques 90 BR-91755110 P. Alegre, RS Brazilo

.....

Korespondi pri diversaj temoj volas 40-jara rusa inĝeniero de aviado. Sergej Lebedev P.O. 90 Box 6881 (20) 7000 90 Tashkent Uzbekujo

.....

# Kamratposten kaŭzis leterrivereton

Fine de marto 1996 venis numero kun interesa artikolo pri esperanto: pri familio Svenonius en Malmö, kiu adoptis esperanton kiel familian lingvon, kaj pri la lerneja klaso en Hjulsta (Stokholmo), kiu studis esperanton por viziti la esperantokursejon en Grésillon en Francio.

Dum la sekvantaj monatoj venis entute 70 informetoj de infanoj loĝantaj diversloke en Svedio. La aĝoj variis inter 10 kaj 14 jaroj. Kelkaj el ili ekstudis esperanton pere de nia leterkurso. El tiu grupo kelkaj pagis membrokotizon por fariĝi membroj de SEJU.

Estas malfacile por SEF kaj SEJU stimuli kaj reteni tiel junajn membrojn, ĉar ili ofte aperis en lokoj malproksime de kluboj kaj unuopaj membroj.

Dekjara Jakob en Uppsala legis la gazeton *Kamratposten* kaj tuj petis informojn. Li tuj ekstudis la leterkurson. Post kelkaj semajnoj venis peto de Jakob: "Sendu informmaterialon al mia samklasanino Fanny". Post tri semajnoj

venis respondo al "letero 1", kaj informo, ke ŝi veturos al Aŭstralio por ĉ. 6 semajnoj kun siaj gepatroj. Fine de julio venis letero de hejmenveninta knabino. Ŝi rakontis ke la familio, survoje hejmen, en la aviadilo al Kopenhago sidis apud viro, kun kiu ili iomete babilis. Montriĝis, ke tiu persono estis konata esperantisto (J. Brozovski) loĝanta en Japanio. Kiam li ekaŭdis, ke la knabino ĵus ekstudis esperanton, li promesis trovi korespondamikinon en Japanio por ŝi.

Du monatojn poste mi aŭdis, ke venis letero al Fanny el Japanio de samaĝa knabino! Intertempe ankaŭ venis du informetoj de Fanny por du najbaraj ludokamaradinoj.

Informoj pri la infanoj en Uppsala iris kompreneble al la klubo tie. Aliaj similaj ĉenreagoj okazis en kelkaj aliaj lokoj.

Roland Lindblom

## Korespondanto en Japanio?

- Nur laŭ la jenaj punktoj oni petu pri korespondamiko en Japanio:
- 1 Skribu mem leteron por prezenti la propran lingvoscion.
  - 2 Ne preme menciigu sekson kaj aĝon.
  - 3 Skribu almenaŭ la nomon kaj adreson preslitere aŭ skribmaŝine.
  - 4 Ne sendu liston de korespondemuloj.
  - 5 Volonte sendu plurajn petleterojn en unu koverto.

**Koresponda Servo de  
Japana Esperanto-Instituto**  
162 Tokyo-to Sinzyuku-ku  
Waseda-mati 12-3  
Japanio

## NEKROLOGOJ

### Åke Rossdal

Nia fidela membro de EKS, Åke Rossdal, forpasis la 8-an de sept. 1996. Lastatempe li suferis de malforta koro kaj kuŝis en malsanulejo tri semajnojn por akvo en la pulmoj.

Li estis instruisto kaj havis grandan intereson por fremdaj lingvoj. I.a. li flue parolis la nederlandan lingvon. Fine de la kvindekaj jaroj li aliĝis al la klubo de Stockholm kaj samtempe al KELI. En la Stokholma rondo de KELI li fervore gvidis nin en esperantaj studoj.

Åke naskiĝis 28/11 1909. La entombiga ceremonio okazis la 25-an de sept. en la Matteuspreĝejo en Stockholm.

Arne Lundkvist

### Sigrid Åkesson

I ett kortfattat brev av den 24/8-96 låter Ulf Ribers i Motala Esperantoklubb meddela att klubbens mångåriga medlem och kassör Sigrid Åkesson har avlidit. Sedan klubbens verksamhet i stort sett upphört har Sigrid Åkesson fungerat som förvaltare av klubbens tillgångar.

Begravningsgudstjänsten ägde rum den 30/8 i Heliga Korssets Kapell i Motala.

# SVEDA ESPERANTO- FEDERACIO

*aranĝos sian kongreson  
dum pentekosto en  
Esperantogården en  
Lesjöfors. Pri kotizoj,  
programo k.t.p. vidu  
la sekvontan numeron de  
La Espero.*

## La Esperanto-semajno

La semajnon 9 – 14 sept. la Esperanto-kluboj en Gotenburgo kaj Kungälv lanĉis kiel **La Esperantosemajnon**. Estis semajno por informado, sed ankaŭ komenciĝo de la studsezono.

**Daniel Durand el Francio** estis invitita helpi en tiu informlaboro, speciale ĉar la organizo, kiun li prizorgas kaj ankaŭ prezentis, **Monda Fonduso Kontraŭ Malsato**, uzas Esperanton kiel oficialan lingvon.

Dum la semajno li prelegis kvar vesperojn en la Esperantokluboj en Gotenburgo kaj Kungälv kaj sabate li ankaŭ vizitis Falköping, kie la klubo aranĝis ekspozicion en iu foiro kaj kie li havis etan prezentadon. Li prelegis pri:

1. Monda Fonduso de Solidareco Kontraŭ la Malsato (kiun li mem bone

prezentas en la apuda artikolo).

2. la mondĉivitana movado al kiu apartenas Monda Fonduso.
3. sia laboro kiel loka gvidanto por Monda Turismo (plej ofte estis polaj aŭtobusoj).
4. la franca esperantomovado, speciale de la regiono de Anjer en la valo de Loire.
5. la Internacia Tradukreto, kiun li momente estras (tre interesa afero kiu postulas sian propran artikolon).

Do estis vere tre informriĉa kaj instrua semajno. Li ankaŭ gvidis kurson du vesperojn. Estis kurso pri Afriko, speciale pri Zairio kaj la projektoj de Monda Fonduso tie, kaj tiun kurson ni daŭrigos dum la aŭtuno per helpo de lia materialo. Dum la antaŭ- kaj posttagmezoj li vizitis diversajn ĵurnalredakciojn kun pli aŭ malpli bona sukceso.

Märtha Andreasson

## Kreskego dum klubaj kunvenoj

Stokholmanoj plezurigas la kunvenoj de la Esperantoklubo de Stokholmo. Almenaŭ oni konstatis kreskegon de la ĉeestantaro dum la kunvenoj ĉijare, ĉu pro pli alloga programo de la klubo aŭ pli tedaj televidaj programoj la statistiko ne klarigas. Kiam la kongresurbo Prago estis la temo ni spertis la amasiĝon de "sardinoj en skatoleteto".

La rilatojn kun la neinicitoj ni kulturis per interreta informpaĝo kaj semajnfinaj kursoj. Ekster la klubo okazis granda aranĝo, vojaĝo de klaso de la baza lernejo en Hjulsta, antaŭurbo de Stokholmo, al la Esperantokastelo Grésillon en Francio. Klaso kiun antaŭe socialaj problemoj ĝenis, sukcesis efektiviĝi revon pri vojaĝo al Francio helpe de donacemaj esperantistoj. La studado de Esperanto kompreneble estis parto de la tuta aranĝo.

Jan Setréus

# LA MONDA FONDUSO

La tero estas nun kapabla produkti pli ol duoblo de la prinutra neceso, sed tamen multaj homoj suferas pro malsato aŭ por misnutrado. Netolereble! En kelkaj landoj ekzistas helpa sistemo kiu ebligas la viktimojn ricevi iom da nutraĵo kaj kelkfoje iom da instruado por sin elturni. Sed plej ofte la viktimoj devas kalkuli kun si mem.

Antaŭ ne longe mi ricevis de zairiaj korespondantoj tiun informon, ke laŭvice la unuan tagon manĝas la infanoj, la duan la gepatroj k.t.p. Kiam oni atingas tiun punkton de mizero, kiamaniere elpensi kaj realigi projekton?

Nia respondo estas simpla kaj duobla:

1. Solidareco! Loka solidareco inter samsortanoj, senlima solidareco inter ĉiuj, kiuj rifuzas la faton de tiu situacio.
2. Kiel fina celo, klopodi por iam proponi al la mondo la kreadon de tutmonda institucio pri solidareco.

Monda Fonduso de Solidareco Kontraŭ la Malsato havas tiun duoblan celaron. Fondite en 1982, ĝi jam multfoje pruvigis la efikon de tiu sistemo. Kelkaj ekzemploj:

En la vilaĝo Nkolntsa en Kamerunio kelkaj vironoj elpensis la projekton sin grupi por ŝangi la vivon de la vilaĝo. Per financado de Monda Fonduso, ili unue plantis 5000 ananasujojn. De tiam ili vendadas belajn ananasojn sur la lokaj bazaroj kaj ĝis la ĉefurbo Yaoundé, dum la malbelaj ananasoj, tamen gustallogaj, bonfartigas la infanojn kaj la familianojn per la vitaminoj. La profitoj de la vendado utilas por aranĝi kolektivajn ekipojn kaj provizi la vilaĝon per diversaj varoj. Ili aranĝas tri fontojn por ke la familianoj havu trinkeblan akvon, ili aranĝas kabanon por instali en ĝi resanigon (unu vilaĝano ricevis la konvenan instruadon); ili aĉetis stokon da medikamentoj kaj havas

la projekton malfermi bazan lernejon en la vilaĝo. Sed ili ne forgesas repagi al Monda Fonduso la prunto parton, kiun ili ricevis por ke alia grupo ie en la mondo laŭvice profitu el tiu solidareco.

En Abaĉang (Togolando), la Grupo Agropaŝtista bredas kaj dresas tirbovojn kaj vendas ilin al aliaj grupoj, kiuj tiel povos kulturi pli vastajn kampojn.

En Nanterre (Francio), grupo da senlaboruloj malfermas iun Domon por Senlaboruloj, kiu ebligas al multaj homoj retrovi oficon aŭ ricevi instruadon.

En Las Coloradas (Argentino) instruistoj finpretigas eduksistemon adaptitan al Mapuĉeaj junuloj. Ili lernas kokobredajn teknikojn.

Jen kion mi venis klarigi al la esperantistoj de la regiono de Gotenburgo dum la loka Esperantosemajno, kaj montri al ili per lumbildoj la konkretigon de tiu senlima solidareco. *La tero nutrus ĉiujn homojn se ĉiuj solidare agadus.*

Notinde estas, ke Esperanto estas la oficiala lingvo de Monda Fonduso, kiel esprimo de egaleco inter ĉiuj loĝantoj de la terglobo. Monda Fonduso estas registrita en la UEA-jarlibro inter la fakaj asocioj. Ĝi eldonas trimonatan bultenon Monda Solidareco.

Adreso por pliaj informoj:

**Monda Solidareco**  
**Les Nids**  
**FR 491 90 St Aubin de Luigné**  
**Francio**  
**Tel./fakso +33 (02) 41 78 47 75**

**Daniel Durand**  
 Adjunkta Ĝenerala Sekretario

## Ankaŭ aliaj kluboj aktivas

Mi ŝatus informi en ĉiu numero pri diversaj atentindaj aktivecoj en niaj kluboj.

Hodiaŭ mi legis la kluborganon de la klubo en Norrköping. La agadraporto montras, ke multaj el la 60 membroj aktivas diversmaniere. Mi ankaŭ parolis kun Haldo Vedin kiu tre ĝojas pro la tri kursoj, kiuj komenciĝis aŭtune kaj ankoraŭ aktivas. Inter la komencantoj troviĝas pluraj gejunuloj.

La klubo en Malmö fariĝis Patrono de la Esperantodomo en Lesjöfors. Ili donacis 5 000:-. Bonege! Familio Sve-nonius faras reklamon por esperanto, per sia ĉiutaga uzado de esperanto. Sten faras ĉiusemajne radioprogramojn por lokaj elsendoj. Grupo da klubanoj ĉirkaŭbiciklis en iu tago en la aŭtuno kaj dismetis reklamafiŝojn en Malmö La bicikloj estis ekipitaj per afiŝoj por vekti ekstran atenton.

La klubo en Helsingborg dum vico da jaroj ne multe aktivis, sed io okazis dum la lasta jaro. Kursoj troviĝas kaj venis 12 novaj membroj. En la loka radio aperis pluraj kaj longaj programoj pri esperanto. Iu persono kiu laboras pri radio kaj gazetoj (ne-esperantisto) partoprenis en la kongreso en Prago kaj faris multajn intervjuojn, kiujn li nun disaŭdigas en radio.

En venonta numero mi certe skribos pri via klubo.

Roland Lindblom

# Esperanto en Kroatio

*Alvenis manuskribita kopio de la prelego de Spomenka Stimec en Karlskoga printempe de 1996. Temas pri "Superrigardo pri Esperanto en Kroatio kun mia enfokusigo de Esperanto en la paco, Esperanto en la milito". Ni anticipas pri indulgo pro eventualaj mis-kriboj en la reprodukto de la originala teksto.*

Esperanto alvenis al Zagrebo en la unua jardeko de nia jarcento kaj en tiu unua tempo la ĉefan rolon havis virino. Ŝia nomo estis Danica Bedekoviĉ, ŝi estis instruistino kaj iusence ŝi enkondukis ankaŭ la nunajn feminismajn pensojn pri emancipiĝo de virinoj en mian urbon kaj mian parton de suda Eŭropo.

Alia persono kiu ĉirkaŭ la unua mondmilito tre gravis kaj kiu iusence havas paĝon en la monda literaturo estas Kastner kiu estis posedanto de tuta serio de vardomoj sub la nomo de Kastner und Öler en Austrio-Hungario kaj ankaŭ en Kroatio, ĉar en komenco de la jarcento Kroatio estis parto de la Austrio-Hungaria Imperio. Kiu legis la libron de Tomas Mann *Der Zauberberg* eble renkontis paĝon pri Esperantisto, kiu estis en Davos-kuracejo en Svislando. La aŭtoro moken rilatas al Esperanto ĉar tiuj malsanuloj pro longaj jaroj de kuracado okupiĝis pri Esperanto kaj la aŭtoro mencias kelkajn frazojn: "mi petas la sukerojn" aŭ similaj. Mi aŭdis de tiu sinjoro Kastner ke li ne parolis la kroatan, li estis aŭstro kaj parolis la germanan, kaj li komencis enkonduki Esperanton, kiun li lernis en Davos dum la kuracado.

Unu sinjorino, Jelena Manojloviĉ, helpis multe pri la historio de Esperanto en Zagrebo. Ŝi vivis 94 jarojn kaj havis brilan memoron. Kiam ŝi atingis 70 jarojn ŝi haltigis sian internacian kondukon pensante ke ŝi devas ŝpari monon por la entombigo. Sed ŝi legis pri la kongreso en Islando kaj pensis ke ŝi povus prokrasti la ŝparadon.

La tre grandan ĉapitron en la esperanta movado donis doktoro Ivo Lapenna, profesoro pri juro en la universitato de Zagrebo, kiu fakte naskiĝis en la urbo Split. Al li ni hodiaŭ en Zagrebo dankas la fakton ke ni dum kvin jardekoj posedas esperantan klubon en la plej luksa kvartalo en Zagrebo, Amruševa 5, kiun ni profitas ĝis hodiaŭ. Nun ni atendas tribunalan decidon por esti elĵetotaj, ĉar ni ne plu havas rajton en tiu loko laŭ la ŝtato.

Lapenna laboris en la Internacia Tribunalo en Hago, kaj en la jaro -48, kiam Tito rompis kun Stalin li hazarde estis en Londono en oficvojaĝo. Li ne plu revenis al Jugoslavio sed restis kiel rifuĝinto. Li sukcesis trovi postenon en pluraj kolegioj en Britio, sed li estis denaska slavo kun franclingva edukado kaj la angla estis tre fremda lingvo por li. Brita Esperantisto helpis lin perfektigi siajn prelegojn.

Mi lernis Esperanton en la provinco kiam mi estis 16jara kaj kiam mi poste venis al la ĉefurbo por studi, mi renkontis la plej vigran Esperantan klubon en Eŭropo, kaj venontjare festos 40 jarojn de kontinua Esperanta vivo. Tre grava elemento en miaj komencaj Esperantaj jaroj estis tiu kategorio de Esperantaj "onkloj". Unu tagon kiam mi estis 16-jara sonorigis la poŝtisto ĉe la pordo, kun letero en la mano. Ĝi komencis: "Estimata sinjoro...". Mi ankoraŭ ne lernis la vorton "estimata", mi estis ĉe la sesa leciono, kaj mi estis knabino, ne sinjoro. Mi korespondis kun mia japana onklo dum tri jardekoj. Li eldonis la tradukon de miaj libroj en la japana. Mi vidis lin unu fojon, kiam mi enscenigis mian teatraĵon en Pekino. Li venis nur unu tagon al Pekino por renkonti min, kaj elektis ĝuste la plej stresan tagon en mia vivo. Post la teatraĵo ni parolus, sed post la teatraĵo estis ĵurnalistoj, floroj k.t.p. kaj meze de tia tumulto la onklo malaperis al sia buso. Krom tiu onklo tute specifigis gravas la fakto ke, kiam mi renkontis tiun influon de Tibor Sekelj tiun lian konvinkon al kiu mi forte kredas, ke Esperanto estas pli ol tio kion faras hodiaŭ Esperantistoj.

Tiel mi eniris la zagreban esperantan movadon kaj komencis konstrui ĝin precipe en la jaro 1967. Mi pasigis kelkajn studentajn jarojn tie, sed mi decidis tuj montri al homoj ke Esperanto estas pli ol klubo vespero. Mi estis juna, aplomba kaj aŭdaca kaj mi devis organizi kvin festivalojn: festivalo de filmo, festivalo de kanzono, festivalo de dramo, festivalo de pupeatro... Por pupeatro de Esperanto en Zagrebo mi laboris du jardekojn. Mi tre laboris por Internacia Kultura Servo multajn jarojn, kaj instruis Esperanton en diversaj anguloj de la mondo, kaj tiu Internacia Kultura Servo vere fariĝis nun la zagreba kultura centro. Sed venis la milito, la lasta aktuala milito, kaj ne estis dece labori por Esperanta kulturo. Kosmopolitismo en neniu militoj estas bone rigardata, oni devas meti ĉiun forton en la nacian kulturon. Mi estas Esperantisto, mi apartenas al la mondo, mi havas kroatajn radikojn sed mi ne volus resti ĉe tiaj radikoj. Nur iom post iom mi komprenis ke en tiu milito kiam multaj aferoj detruigis, detruigis mia oficejo dum du jardekoj. Mi komprenis ke mi devos forlasi mian esperantan laboron kaj eniri normalan karieron, trovi iun postenon kaj esti Esperantisto nur nokte vespere, semajnfine aŭ dum ferio aŭ

simile. Mi prezentas al vi libron, tradukon de kroata poezio. Estis mia adiaŭa laboro en la esperanta oficejo, kaj kiam mi reklamis por ĝi en la mondo iu Esperantisto opiniis ke mi kiel malpatrioto agis, rakontante pri ĝiaj multaj problemoj, kaj tiu libro, por kiu mi ricevis kelkajn laŭdojn, donis al mi ankaŭ dosieron ĉe la polico kiel malpatriota persono.

Mi invitis la turkan ambasadoron, ankaŭ poeto al literatura programo. Mi prezentus lin ne kiel ambasadoron sed kiel poeton, kaj li diris "jes, brila ideo". Organizis poezian vesperon kun ambasadoroj kiel recitantoj donus prestiĝon al la Zagreba Kultura Centro. Kiam mi decidis ke mi devis forlasi mian esperantan laboron, la kulturataŝeo de Malajzio diris: "Ĉu vi volas labori ĉe ni en la ambasadejo?" Tiel mi dum unu jaro laboris por malajzia registaro.

Post unu jaro mi decidis eble mi devone faru eksperimenton en mia vivo, reveni al Esperanto, kaj denove mi estas nun aktuale sekretario de Kroatia Esperanto-Ligo. El mia vidpunkto la laboro por Esperanto tiel gravas esti profesia, ĉar Esperanto meritas pli ol niajn semajnfinojn. Se estas milito en Afriko, tie Esperanto estas malforta, de tie vi ne havas raporton kio efektive okazis malantaŭ la kulisoj. Sed en Zagrebo 90 jaroj de tradicio, du jardekoj de laboro por esperanta kulturo. Jen mi, esperanta aŭtoro: Ĉu mi ne devus rakonti kion signifas, kvin jarojn antaŭ la jaro 2000, sidi en rifuĝejo kun bomboj super la urbo? Pri la milito en Kroatio mi verkis tri librojn. Por komenci kelkaj memoroj: Estas mia partopreno en la internacia esperanta movado, en Japanio, en Koreo, en Kubo, en Teherano. Kaj tiu tuta mondo reduktiĝis kiam mi revenis de Teherano per aŭtobuso al kaoso de bataloj, kaj mi komprenis ke la internacia mondo en kiu mi partoprenas reduktiĝas al subtera rifuĝejo kaj mi finis mian vojaĝlibron per la letero: La rifuĝejo esperantista.

Kiam Zamenhof estis komencanto sonis historio malaktuale, nun kiam mi fariĝis komencanto pri milito mi reprenis tekston de Zamenhof kaj timiĝis frapita por ĝia aktualeco. Mi legis ĝue en la banejo, kie ne ekzistas fenestroj ĉar en la urbo regas la ordono pri mallumigo. Ĉiuj fiksis dikajn kurtenojn sur la fenestrojn por ne ellasi lumstrion. Mi havas grandan banejon kaj en ĝin mi enportis etan tablon kaj metis sur ĝin komputilon por povi verki. Dume ĉe mi estas ae-

ralarmo kaj mi devas mallumigi la lumojn.

Kion faras Eŭropo? Eŭropo en sia ĉiutaga fluo rigardas la sangan konflikton kvazaŭ pri videoludo temus. Estus eble interesa por vi scii ke multaj homoj kiuj fuĝis el siaj hejmoj kunportis esperantaj lernolibrojn. Vi povas imagi ke tio por multaj estas la ideo pri la internacio, pri la mondo, eble. En mia novelo Simpla Tago mi prezentas kiel aspektas simpla tago de Esperantisto en la milito: Tio kio aŭdeblis de la fenestro estis paserĉirpo, kia privilegia afero esti vekita de la paseroj kaj ne de sirenoj. En la leterkesto atendas mesaĝo de la gastributejo ke la gaso pli multe kostiĝis, kvincent okdek kvaroble, tio estas la milito. Al la banko, longa vico, la kasis-tovis doni al mi nur la duonon de mia mono. "Ĉu vi ne scias ke ni estas en la milito", li diris?

Mi malfruis en la oficejo, kaj tie atendis tri homoj, du estis junaj soldatoj kiuj transportis sian amikon, mortigitan francan soldaton, al la ĉefurbo por enterigi lin. Eble la esperanta movado povus helpi trovi la identecon de Pierre? La Franca Ambasadego devus solvi tiun problemon, mi diris. Sed la ambasada oficejo laboris tiel malrapide kaj ili devus enterigi tiun knabon postmorgaŭ. Se oni ekscius pri la familio oni ne devus enterigi lin ĉi tie, sed resendi lin hejmen. Mi telefonis al Francio kaj la junaj soldatoj revenos morgaŭ.

Mi permesis al mi per kalkaji ĉapitroj el mia libro ilustrati kiom mi travivis en la lasta jaro. Kun donacio de mortinta Esperantisto mi volis renovigi la urbon kaj la Esperantismo estis la unua kiu mal-

fermis la pordon al la kultura ekspozicio, pentraĵa "ekspo" el Ĉinio kaj simile kaj mi ĝojas ke la Esperantistoj en la mondo klopodas helpi al tiu mondoparto nun. Nia gazeto, oficiala gazeto de Kroatia Esperanta-Ligo, nomiĝas Tempo por kio mi sukcesis trovi subvencion je du fontoj, ĉe Bona Animo kiu donis monon por presi ĝin ke ni montru al la mondo ke ni transvivis, kaj mi sukcesis konvinki ministerion pri ekstera rilato.

Ni faris du grandajn aranĝojn lastjare, unu kiu rilatis al Svedio en via kulturo. Lastjare vi celebris kvindek jarojn de apero por infana libro, tio estas libro de Pipi Ŝtrumpolonga. Kiam ni pensis kiel ni revigligu la urbon post la milito ni decidis ke ni faros feston de Pipi. Pipi estas spektulema. Pipi havas nenium ideon pri la milito. Ni faris grandiozan feston, la festo daŭris sep tagojn. Mil kvincent infanoj partoprenis, televido raportis trifoje kaj la Pipifesto estis sur la titolpaĝo de la posttagmezaj ĵurnaloj. Kaj tio estis laboro por Esperanto. Esperantistoj klopodas ion fari por revivigi la urbon.

Ĉijare mi aŭdis ke UNESCO deklaris tiun jaron la Jaro de Permanenta Edukado. Mi decidis enfokusigi la plej aĝan tavolon de la homoj, kiu fakte ege multe savis la familian vivon en la milito, la geavoj. Ni organizis feston de geavoj kiu daŭris dek tagojn, kvin televidajn elsendojn k.t.p. Postmilite mi agas en tiu maniero.

Estas multaj kaj diversaj eblecoj prezenti la esperantan vivon en Zagrebo.

Spomenka Stimec

## INTERRETO

# Kvindek mil vizitoj en unu jaro

La 5-an de februaro 1997 la kalkulilo sur la interretaj paĝoj de Sveda Esperanto-Federacio ([www.esperanto.se](http://www.esperanto.se)) registris la 50-milan viziton. La informejo ekfunkciis antaŭ proksimume unu jaro kaj la nombro da vizitantoj kreskis de kelkaj unuopaj po tago en februaro 1996 ĝis 500 – 600 po tago en februaro 1997.

La ttt-informejo de SEF estas tre ampleksa. Pli ol 1500 dosieroj (tekstoj kaj ilustraĵoj) troviĝas en ĝi, okupante pli ol 10 MB da spaco. Plejparto de la informoj estas en la sveda lingvo, ĉar SEF direktas sin unuavice al sveda publiko.

Plej ofte la vizitantoj vizitas "Kioskon", registron da ligiloj al 1800 gazetoj tra la tuta mondo (esperanta aliro: [www.esperanto.se/kiosk/espindex.html](http://www.esperanto.se/kiosk/espindex.html)). Ĝi estas speciale populara ĉe bibliotekoj kaj lernejoj klasoj kun multaj diverslandaj lernejoj. Sed ankaŭ ĵurnalistoj el eksterlando kaj maristoj aŭdigis sin per retleteroj kaj esprimis sian aprezon. Serĉante gazetojn tra la mondo la vizitantoj ricevas, vole-nevole, instigon informiĝi pri esperanto. Ĉi tiu re-

ta kiosko estas, eĉ laŭ opinio

de usonaj spertuloj, unu el la vere plej internaciaj kaj riĉaj. Cetere la informejo de SEF havas abunde da informoj pri esperanto, inkluzive de interreta kurso por svedoj. Ĝi funkcias ankaŭ kiel varbilo de novaj membroj, kiuj povas aliĝi per retaliĝilo.

inko

KIOSKEN estas la plej populara "paĝo" en la informejo de SEF. En ĝi estas kolektitaj ligiloj al pli ol 1800 gazetoj tra la mondo, unuavice kun novaĵoj en la naciaj lingvoj. Ĝi ne temas pri esperanto, sed per reklama ŝildeto instigas la "vizitantojn" informiĝi pri esperanto.

54207↑

# KIOSKEN

## ESPERANTO

[English menu](#)[Menuo en esperanto](#)

I KIOSKEN hittar du **1829** länkar till tidningar med internetutgåva, från **131** länder. Vi har i första hand valt dagstidningar, men även andra tidningar av nyhetskaraktär. Vi har föredragit att lyfta fram sådana som visar nyheterna på landets språk. Bara när vi inte hittat någon, eller om det använda alfabetet orsakar problem för oss i västerlandet, har vi tagit med några på annat språk.

Tidningarna kan oftast läsas gratis, dock inte alla. Några vill att du registrerar dig innan du får ta del av innehållet. Vi har inte kunnat testa alla länkarna och kan därför inte garantera att de alltid fungerar. Känner du till någon nyhetstidning som ännu saknas, lämna oss ett meddelande. Likaså om

**Senast tillkomna eller ändrade länkar:**

Tre nya länder har tillkommit: Nordkorea med nyheter från sin officiella nyhetsbyrå, Vitryssland med Belaruskaja Delovaja Gazeta, Minsk Economic News, Vetjernij Minsk, och Elfenbenskusten med fyra franskspråkiga tidningar: Fraternité Matin, Le Jour, La Nouvelle République, La Voie.

Nya är också The Chronicle, Daily Graphic, Ghana Drum, Ghana Review, Ghanaian Times och The Independent från Ghana, The Economic Review, Karengata Chronicle, Kenya News och The Weekly Review från Kenya, och The Weekly



La svedaj esperantistoj havas nun propran kursejon

# "Esperantogården"

En numero 2/96 de La Espero la sveda esperantistaro estis invitita partopreni la konstituciantan kunvenon de la kooperativo Esperantogården, kiu estis okazonta en Skansen en Stockholm la 30-an de junio. Pli ol 40 esperantistoj renkontiĝis en Skansen kaj apogis la proponon. Kunlabore kun Sveda Turista Asocio oni decidis komenci la laboron, kaj oni konsentis pri statutoj. Volontuloj estas bonvenaj kontribui al la laboro. Bonvolu telefoni al Esperantogården 0590-30 909.

Jen raporto el La Tria Bulteno de Esperanto-Asocio Bergslagen en decembro:

Post duonjara negocado kaj multa diskutado, la sveda movado subskribis aĉetokontrakton en novembro, kaj per tio nun posedas propran Esperantodomon.

La kursejo/Esperantodomo situas en la orienta parto de la provinco Värmland, norde de la granda lago Vänern. La kursejo situas meze inter la ĉefurboj Stokholmo kaj Oslo. La distanco de Stokholmo estas ĉirkaŭ 300 kilometroj. Je la sama distanco troviĝas la havenurbo Gotenburgo.

Vi trovos la Esperantodomon en la urbo Lesjöfors (Lešeŝoŝ), tre malno-

va loko de ferofarado, kiu nun estas parto de la komunumo Filipstad. Lesjöfors estas nuntempe kvietaj "vilaĝo" kun proksimume 2000 loĝantoj.

La kurseja domo estas bela 2-etaĝa domo el brikoj. Ĝi antaŭe funkciis kiel maljunula hejmo. Nun ĝi estas posedata de la sveda esperantomovado kaj ĝi fariĝos kursa kaj konferenca centro.

La Esperantodomo estos ankaŭ malfermita por homoj, kiuj turisme vizitas la regionon. Tiu ebleco troviĝos inter la diversaj kursoj kaj konferencoj, kaj estas necesa pro ekonomiaj kaŭzoj.

La Esperantodomo estas de bona kvalito kiel tranoktejo por turistoj, kaj la prezoj estas moderaj. Esperantistoj kaj membroj de la Turista Asocio pagos

nur ĉirkaŭ 100 SEK por unu nokto.

La Esperantodomon posedas kooperativo. Ĉiu esperantisto rajtas fariĝi posedanto kaj membro de tiu asocio. Oni aĉetas investatestojn, kiuj kostas po 100 SEK, kaj oni rajtas aĉeti kiom ajn sen limigo.

En februaro 1997 la Esperantodomo estos preta por akcepti la unuajn gastojn. La unua granda konferenco okazos dum pentekosto, kiam la Sveda Esperanto-Federacio okazigos sian jaran kongreson. Por tiaj okazoj troviĝas grandaj ejoj je dispono en "Popola Domo" en la proksimeco de la kursejo. Poste, en la aŭtuno, okazos seminario de la Sveda Esperantoinstituto.

Grésillon estas tre konata esperantista kursejo kaj troviĝas ankaŭ aliaj kursejoj en Francio. En aliaj landoj troviĝas diversspecaj kursaranĝoj kaj nun Lesjöfors viciĝas en tiu aro.

